

1921-08-22-sergeant-fousek_1

Kara amiko.

Vian bonkoran & ŝatindan leteron mi trovis hejme kiam mi vespere revenis vendredon, la 19an.

Mi esperis ke ĝi estus tie & mi ĝojis vidante ĝin. Tiu letero estas tre bela, pli bela ol viaj aliaj & oni bone vidas ke la Kongresaj impresoj influis vin.

Mi esperas ke tiu sama influo havas ankoraŭ nun sian povon sur vi & ke vi ne facile forgesos ilin. Same por mi = post ĉiu Kongreso, kiun mi ĉeestis, la tuta estaĵo mia estas sub ĝia influo & estas kvazaŭ tute esperantigita. Kiel nia Kara Lingvo ŝanĝas la vivon. Oni sentas, oni tremas, oni vibras, al & de tiu Esperantismo. En la materialaj detaloj ĉiutagaj oni sentas ke vivas & kriadas tiu ideala parto de ni mem: Esperantismo & ĝiaj Kongresaj impresoj kiuj estas ĉiam & ĉie neforgeseblaj, ĉu ne?!!!!!

Mi pasigis 5 tagojn tre agrablajn en Alsace

1921-08-22-sergeant-fousek_2

kie la popolo estas feliĉa, kiel vi, de la liberigiteco.

Pluvis multe sed tamen oni ĝojis kun la Alsacanoj.

Ni estis en Parizo la 17-an kie mia artemeco ĝuis multajn belajn impresojn. Parizo estas vere belega. Mi ofte vidis belaĵojn sed neniam tielajn kiel la monumentojn, la ponton Alek. III. , les Champs Elysées, la Grandan Palacon, la Malgrandan Palacon, la Tribunalon, la Panthéonon, la „Invalidés“ & ĉefe la belegan „Arc de Triomphe“. Mia animo kriis pri ĝojo vidante tiun arkitekturon & la belan perspektivon de la 12 „avenues“ kiuj ĉirkaŭas ĝin. Sur la bulvaroj ekzistas grandaj bruoj & ĉiu virino ŝajnas pentrita kvankam bela.

Rigardante la Tour Eiffel (300 metr.) mi pripensis al alia fera eto apud Praha & multaj belaj memoroj premiigis, en mia cerbo, unu post la alia.

Tiuj memoroj estas kvazaŭ konstanta kinematografo en mia menso & multe pli vivantaj ĉar mi flaras, aŭdas & sentas ĉion tute tiel kiel mi estus sur tiuj montetoj; mi flaras la bonan odoron de la tero & de la florojn kiujn en la granda varmego oni akvuminis. Kiaj belaj floroj, kia bela verdaĵo apud la benko kie oni sidis. Ĉu vi kredas ke kelkaj

1921-08-22-sergeant-fousek_3

Esperantaj Kongresanoj povus forgesi la multnombrojn impresojn de tiuj tagoj? Ĉu estas eble?

Mi laciĝis multege en Marienbad, Eger & Franzebad. Poste en Karlsbad mi retrovis mian sanon. Ili estas tre belaj & ŝatindaj banlokoj. La paroladoj antaŭ la monumento al Zamenhof estis tre impresaj. Mi estis kun s-ino Z. ĉiun momenton. Ŝi faris tre gravan komunikon al mi, sabaton, en la fermanta kunsido. Ŝi diris al mi ke D-ro Alek. Zamenhof (nia amiko) sin mortigis!!! Li ne mortis, tute ne, de kora paralizo. Li prenis opiumon, kredeble la 24-an de Julio 1916, samtagon kiam li skribis sian leteron al mi. Nun, mi komprenas tiun leteron! Vi povas imagi mian emocion post tiu komuniko de s-ino Z. Mi ĉiam imagis & imagis & vidis Lin!!! Ŝi diris al mi ke lia Hospitalo oni kredis ke li estis spiono & pro tio li eble sin mortigis. Tio miras min ĉar li estis granda kuraĝulo & tute ekstere de la ordinaraj homaj suspektoj!!! Samtempe ŝi diris al mi ke Sofino, ŝia filino vivas, & estas

1921-08-22-sergeant-fousek_4

en hospitalo Bolshevika en Rusuj sed tamen ŝi ne povas korespondi kun ŝi. Mi provis hieraŭ & skribis al ŝi sed mi ne havas grandan esperon.

De mia reveno mi ne havis multan tempon ĉar mi devas ĉiam rakonti mian vojaĝon longan (25 tagojn) al amikoj. Mi ludis tenison sabate, hieraŭ pluvis sed tamen mi iris. Post 4 da h' mi denove iros. Ĉiu tage je la 5-a mi ludas.

Feliĉe ke mi havas tion ĉar nia urbo estas tiel malpura, tiel industria & komerca ke mi ne scias kiel bone vivi sen nia belega tenisejo. Estas 7 ludejoj en tiu teniso.

Mi trovis mian filon maldikiĝita, kiel kadavro...., sed li gajnis ĉiujn gravajn premiojn en la turniroj. La ĵurnaloj ĉiuj rilatas pri lia ludo. Li estas tro juna & venkas homojn 25 jaraj & kiuj estas pli fortaj ol li. Tamen li tre bone fartas.

Mi havas preskaŭ plenan valizon de paperoj, dokumentoj, P.K., gvidlibroj pri Esperanto k. t. p.

Mi ne ankoraŭ havis tempon por ilin legi. Sed vidante ilin, mia koro ekbatas pli forte memorante ĉion pri kio ili parolas.

1921-08-22-sergeant-fousek_5

ordigante la enhavon de alia valizo, mi ankoraŭ vivas mian vojaĝon – ventumilon verdajn stelojn, flagetojn, robojn, balan robon kiun mi ne metis de post tiu momento!!! Ĉiu estas sorbigita (se oni povas diri tiele) de memoroj, de Esperantismo, de Kongresismo. Eble ni Kongresanoj estas iom fanatikoj... sed ĉu kelkafoje fanatikeco ne estas tre agraba en la ĉiutaga griza vivo?

Mi rigardas vian fotografaĵon (la 1an kiun vi sendis). En kiu jaro vi farigis ĝin? Vi multe dikiĝis de post tiu momento, ĉu ne?

Mi ankaŭ bone vidas vin en lasuj momentoj & ni bone aŭdis vian tramveturilon sed ni kredis ke ĝi estis la alia irante alian direkton.

Ni deziris adiaŭi vin suprenirantan sed kiam ni rigardis, vi ne plu estis ... do la lasta vidaĵo estis vi, rigardante nian fenestrojn kun manoj kunmetitaj...

Mia edzo & mi multe, fervore dankas vin por via afableco, via gvideco, via gastigeco dum nia Praha ĉeesto. Ni ĝojis renkontiĝi &

1921-08-22-sergeant-fousek_6

konatiĝi kun tiel afabla Esperantisto Ĉeĥa. Dankon, grandan dankon pri ĉio.

Vi sendube vivas la dolĉan, novan animstaton de Patro, nune. Mi ĝojos kiam mi scios.

Nun, mi forlasos, vin. Jes, la poezio de Schulhof estas vera: „Ho ve, koro disŝirita... k. t. p. Mi ne ankoraŭ havis tempon legi la verkojn liajn sed mi promesas al mi grandan ĝojon legante tiujn belajn poeziojn kiuj ankaŭ estas memoroj de tiuj neforgeseblaj tagoj.

Do, kara amiko, ĝis la revido letere. Dezirojn sincerajn al via edzino pri ŝia sano.

Tute sincerajn salutojn ideale Esperante

Alice Sergeant